

TAMEN PLU

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO MARTO 2010, JARKOLEKTO 29
Redaktanto: Bob Felby – tel (08) 8242 1460 – 6 Dorset Street, Semaphore Park. S.A. 5019

esperantobob@bigpond.com

Legeblas ankaŭ surrete: www.gazetejo.org

Eniras geedzoj en la malsanulejon por tie peti helpon pri la naskiĝo de ilia baldaŭ naskota suĉinfaneto.

La kuracisto rakontas al ili, ke la malsanulejo ĝuste nun testas tre mirindan maŝinon, kiu transigas la doloregojn de la patrino al la patro de la suĉinfano. Li demandas ilin, ĉu eble interesus ilin provi tion. La respondo estis eĉ tre pozitiva, ĉar la baldaŭaj gepatroj estis eĉ tre ekscititaj.

La kuracisto ŝaltis la maŝinon je 10 elcentoj, ĉar, kiel li klarigis al la baldaŭaj gepatroj, 10 elcentoj estas verŝajne pli da doloro ol la baldaŭa patro iam ajn en sia vivo travivis. Sed feliĉe, la edzo tute ne sentis iun ajn doloron, certe ne doloregon. Li petis, ke la kuracisto ŝaltu la maŝinon je 20 elcentoj, kaj la kuracisto faris tion.

Ankoraŭ la edzo sentis sin tute sana kaj komforta. La kuracisto, ĉar li estis tre konsciencia, kontrolis la sangopremon de la edzo kaj trovis, ke tiu estas eksterordinare forta kaj sanega.

Ili do decidis provi 50 elcentojn. La edzo ankoraŭ sentis sin sendolora, tre bonfarta kaj eĉ tre ĝuis la travivaĵon. Ĉar la dolortransigo tre helpis al la naskanta patrino, la edzo kuraĝigis la kuraciston transigi la tutan doloregon al li.

Bone, eĉ bonege, ĉu ne? La edzino, kun la helpo de la kuracisto, naskis tre sanegan kaj belegan suĉinfaneton. Kaj la edzo kaj la edzino estis tre ekscititaj.

Hejmen venintaj ili trovis la poŝtiston mortinta antaŭ ilia pordo.

Gravaj Esperanto-eventoj:

Merkredon la 3an de marto je la 18a horo, okazos renkontiĝo en la skatolfabriko por nia jarkunveno. Tiuj, kiuj pagis la kotizon por 2010 rajtas voĉdoni !

Merkredon la 10an de marto la legorondo renkontiĝos en la Ŝtata Biblioteko je la 11.00a horo.

La UEA-kongreso de Esperanto okazos refoje en la belega urbo Havano, Kubao.

Aŭstralia Esperanto-Asocio festos sian centjariĝon per jubilea kongreso en Kolegio Sankta Anna, en Adelajdo de la 9a ĝis la 16a de julio 2011.

Universala Esperanto-Asocio kongresos de la 23a ĝis la 30a de julio 2011 en Kopenhago, Danujo.

La Esperanto-kongreso de Universala Esperanto-Asocio okazos en 2012 en Hanojo, Vjetnamujo.

La ĉiujara ĉefkunveno de ESA

Okazos merkredon la 3an de marto en la skatolfabriko. Bonvolu veni partopreni, ĉar via partoprenado estos ne nur grava, sed ankaŭ necesa !

La miraklo

Dimanĉon la 3an de januaro okazis granda miraklo. Sandor, mi kaj neesperantoparolantino estis en la urbocentro de Adelajdo post kiam ni vizitis kinejon por vidi filmon.

Ni atendis ĉe la semaforo. Subite, aliflanke de la strato mi vidis virinon, “Ĉu mi vizaĝo aspektas jes, esperantistino kun la sama mi, Suzanne permane salutis, ŝi Kiam semaforo ni atendis strato. Kiam ŝi estis jam transirinta la duonon de la strato, mi kriis, ”Saluton, ĉu vi parolas Esperanton?”



konas ŝin?” Ŝia iom konate. ”Ho el Melburno, fakte familia nomo kiel Palmer. Mi aspektis konfuzite. verdiĝis la sur nia flanko de la

Finfine ŝi vidis, rekonis kaj salutis min. ”Venu!” ŝi diris. ”Trevor (Holton, ŝia edzo) estas tie ĉe nia aŭto” – ŝi indikis per sia fingro.

Ni ĉiuj staris apud la aŭto salutante Trevoron, ilian filon (ankaŭ Esperantoparolanto) kaj ties amikinojn. Sed imagu! Kvin esperantistoj kune, tute hazarde en la sama loko.

En tiu momento, subite sur la strato tuj apud ilia aŭto paŝis ALIA ESPERANTISTO, Katarina Taggert kun sia edzo Mike. Tio estis vera miraklo. Ses esperantistoj hazarde renkontiĝis sur la strato en Adelajdo.

Poste Sandor kaj mi invitis Suzanne kaj Trevor (post kiam ni jam adiaŭis ilian filon kaj kunulinon) al nia domo, kie ni babilis, kukumis ktp.

Helen

Ĉu vi scias ke...?

Januare la stacio 3ZZZ elsendis du intervjuojn el Adelajdo.

Ke ĉe la Flandra Esperanto-Ligo aperis nova romano de Trevor Steele, “Kvazaŭ ĉio dependus de mi”? La intervjuon pri la

germantema libro vi povas aŭskulti ĉe la radioprogramo 3ZZZ, elsendata el Melburno. En la komputilo klaku al <www.melburno.org.au> kaj poste elektu 3ZZZ Radio Archive kaj la elsendon de la 25a de januaro 2010.

...samloke kaj samdate troveblas alia Adelajda ero, en kiu Katja Steele kaj Sandor Horvath informas pri la preparoj de la jubilea kongreso en 2011.

K.Steele

Finis pastro sian predikon kontraŭ la danĝeroj de trinkado de alkoholo. Forte li emfazis: "Se mi havus la tutan bieraron en la mondo, mi elverŝus ĝin en la riveron."

Eĉ pli fortege li emfazegis: "Kaj se mi havus la tutan vinaron en la mondo, mi elverŝus ĝin en la riveron."

Kaj fine skuante sian pugnon en la aero, li kriis: "Kaj se mi havus la tutan viskiaron en la mondo, mi elverŝus ĝin en la riveron."

Finiĝis la prediko kaj li sin sidigis.

La ĥ orestro malrapide stariĝis kaj ridetante, preskaŭ ridante, anoncis: "Kaj nun ni kantu himnon n-ron 365 "Ni ariĝu ĉe l' rivero?"

Li ensuĉis Esperanton kun la patrino lakto

(El 'Frederiksborg Amts Avis' la 30an de januaro)

Peter Weide lernis denaske Esperanton kaj daŭre batalas por krei pli da atento pri tiu lingvo, kiu laŭ li estas la plej konvena kiel mondlingvo.

En Melby, Danujo, loĝas la iama instruisto Peter Weide. Li estas unu el la malmultaj kiuj havas Esperanton kiel Vivante en Germanujo de sia patro denaske lernis kiu inter siaj adeptoj jam fariĝi mondlingvo, kiu barojn kaj krei pli da mondvasta vilaĝo".



mil homoj en la mondo, gepatran lingvon. sia frua infanaĝo, li de paroli flue Esperanton, delonge estas elektita helpus forigi lingvajn komuneco en "la

Tiu celo ankoraŭ longe ne estos atingita. Tutmonde estas nur kelkaj milionoj, kiuj regas la lingvon, kaj tio ĉagrenis Peter Weide, kiu mem instruas ĝin. En 1998 li transloĝiĝis al Melby de Hamburgo (Germanujo), li instruis Esperanton dum 40 jaroj kaj en Danujo estas inter la spertuloj.

Kiam homoj diras, ke Esperanto ne estas mondvaste parolata, tiam tio estas eraro. Mi povas trovi Esperantoparolantojn en la tuta mondo, konstatas Petro Weide, tamen dirante, ke oni devas serĉi ilin.

Li mem parolas la lingvon flue kaj malfacile eltenas la ofte iom kaŝite aperantan ridindigon, kiam oni komencas paroli pri la neceso de mondlingvo, kia estas ekzemple Esperanto. Tion mi speciale

renkontas en Danujo. Ĉi tie ĉiuj opinias, ke se oni nur regas la anglan, oni nenie renkontas lingvajn problemojn. Granda miskompreno!, li asertas kun rideto kaj atentigas, ke multaj kaj germanoj kaj francoj kaj hispanoj kaj ĉinoj konsentas kun li.

Li diras, ke por Esperanto hodiaŭ ankoraŭ estas longa vojo al la dekomenca celo esti la mondlingvo.

La hodiaŭ mondo bedaŭrinde ne vidas la bezonon je Esperanto, sed ni ĉi tie en Danujo damaĝas al ni mem koncentrigante tiom pri la angla, li diras kaj montras esploron, kiu evidentigas, ke la angla estas tiom malfacile lernebla, ke ĝi certe estas ĉio alia ol la optimuma kiel ebla mondlingvo.

Se la angla ne estas via gepatra lingvo, vi aŭtomate staras en malavantaĝa pozicio. Tial Esperanto estas multe pli bona. Ĝi estas nekredeble facile lernebla, se oni uzas nur kelkajn horojn semajne, oni povas lerni ĝin en la daŭro de duonjaro, li certigas.

Unu el la grandaj avantaĝoj de Esperanto laŭ Peter Weide estas la fakto, ke la lingvo estas demokrateca.

Esperanto strebas konservi la nunajn lingvojn, dum la angla estas la plej granda lingvomortiganto, kiu ekzistas, ĉar ekonomiaj interesoj kaŭzas, ke la grandaj angleparolantaj ŝtatoj povas trudi al la aliaj devi lerni la anglan kaj per tio malfortigi la naciajn interesojn.

Li ankaŭ substrekas, ke Esperanto donas bonajn eblecojn por sperti kulturajn travivaĵojn, kaj ke oni helpe de gvidlibroj povas trovi esperantistojn mondwide.

De David Abildgaard, tradukis Peter Weide

Grava aldono al nia biblioteko

Ĉiu bona esperantisto jam konas la "Fundamento de Esperanto", ĉu ne? Tiu jam mondfama verko de L.L. Zamenhof. En ĝi Zamenhof klarigis al la mondo tion, kio estas Esperanto. Li tion faris en kvar malsamaj lingvoj; la franca, la germana, la rusa kaj la pola. Oni povus kredi, ke devus enesti ankaŭ la angla, sed ne, ĉar Zamenhof ne sufiĉe bone mastris la anglan pro ĝiaj multaj malfacilaĵoj kaj nelogikaĵoj. Pli postaj libroj aperis en kvin lingvoj, sed iu anglo tradukis ĝin en la anglan por ke ankaŭ angloj deziru lerni tiun mirindan lingvon.

En la komenco de 2009 aperis alia nacia lingvo al la "Fundamento". Du elstaraj italaj esperantistoj tradukis ĝin en la italan. Lilia Fabretto kaj Daniela Quartieron estas iliaj nomoj. Ili faris tre elstare bonegan laboron.

Danke al Lilia Fabretto tiu ĉi libro nun troviĝas sur la bretoj de la biblioteko de "Esperanto en Sudaŭstralio". Se iu el vi interesiĝas pri tiaj aferoj, vi estas bonvena veni por pruntepreni ĝin. Kiel ĝiaj antaŭaj kolegoj, ĝi konsistas el Antaŭparolo, Fundamenta Gramatiko, Ekzercaro kaj vortaro. Interese estas vidi, ke la tradukintoj aldonis, ke tiuj, kiuj havas malfacilaĵojn skribi la diakrititajn literojn, ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ kaj ŭ, rajtas uzadi ch, gh, hh, sh kaj u. Estas neniu mencio pri la "x", sed tion ni ĉiuj eĉ tre bone komprenas, ĉu ne? ĉar "x" tute ne apartenas al la Esperanta alfabeto.

La muzeo parolas Esperanton

Ĉar Esperanto estas parolata en la svisa muzeo de ludoj, eblas, kompreneble, organizi rondiradon kun Esperanto-parolanto kiel ĉiĉerono!

La vizito daŭras proksimume unu horon, sed se oni, dum la vizito, deziras lerni specifajn ludojn, ekz. afrikajn, ĉinajn, romiajn, faraonajn ktp., tiam la tuta vizito daŭras unu kaj duonan horojn.

La muzeo troviĝanta en mezepoka kastelo, enhavas ĉarmegajn ekzemplerojn de ludoj antikvaj kaj modernaj el diversaj landoj kiaj Barato, Afriko, Ĉinujo ktp. Post la vizito oni povas komforte restadi en la belega parko ĉirkaŭanta la kastelon, aŭ iri viziti alian kastelon, ekz. la proksiman Kastelon de Chillon (Ŝijon), aŭ eĉ la Alimentarium de Nestlé.

Por pli da informoj bonvolu kontakti: Cesco Reale, 076 234 1843 aŭ cescoreale@gmail.com. Amike, Cesco.

"Nu, infanoj", diris la patro, "kiu estis la plej dolĉa la pasintan semajnon, kaj kiu estis la plej obeema al Panjo?"

"Vi, Paĉjo, estis la plej dolĉa kaj obeema al Panjo!"

Grava antaŭkongresa seminario

Atendas vin neforgesebla seminario en Kubao. Amerika Komisiono de UEA kune kun ILEI, Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, kaj TEJO ofertas seminarion antaŭ la Universala Kongreso. La seminario okazos samtempe kun la ILEI-konferenco en Matanzas (Canimao). La seminario estas por tiuj, kiuj jam relative

altnivele scipovas Esperanton kaj kiuj interesiĝas pri Esperanto-instruado, pri interkultura edukado kaj lernado per Esperanto, pri interkultura aliro al lingvoinstruado kaj lernadoj kaj ĝenerale pri aktiva kunlaboro en la Esperantomovado. Pliaj informoj haveblas en la unua informilo. Skribu ankaŭ al kubo2010@esperanto-mexico.org por ricevi ekzemple la provizoran programplanon kaj la aliĝilon!

Okazos samtempe kursoj por tiuj, kiuj volas plibonigi siajn konojn pri nia lingvo antaŭ la Universala Kongreso (partoprenontoj havu almenaŭ bazajn konojn de la lingvo) en Havano, do jam en la urbo mem de la UK. Pliajn informojn pri aliĝo peteblas ankaŭ ĉe la adreso kubo2010@esperanto-mexico.org.

Ĉar Amerika Komisiono, ILEI kaj TEJO deziregas helpi al kelkaj latinamerikanoj veni al Kubao por partopreni la diversajn eventojn haveblas stipendioj !

Bonvolu kompreni, ke ni ne disponas pri tre multaj rimedoj, do antaŭvideble estas, ke ne ĉiu petanto povos ricevi stipendion. Plej verŝajne la kvanto de petoj superos tiun de la stipendioj haveblaj.

Rokfestivalo en Roskilde

En 2010, de la 27a de junio ĝis la 5a de julio, dum la Roskilde-rokfestivalo en Danujo, refoje okazos internacia Esperanto-laborbrigado.

Se vi volas senpagan restadon, vi povos tion havi kontraŭ tri tagoj da laboro. Vi povos labori eĉ pli da tagoj kaj almenaŭ parte repagi vian vojaĝkoston. Bonvolu vidi la informojn, kaj se vi emas partopreni, por esti certa pri via loko, bonvolu aliĝi jam nun: <http://roskilde.festoklubo.dk/>

Se vi deziras demandi ion ajn pri la laborbrigado, bonvolu skribi al Simon Damkjær Hazard: blindulo@gmail.com.

La ebleco por viziti tiun plej grandan rokfestivalon en Skandinavujo ne aĉetinte bileton (240 eŭrojn), senpagaj loĝloko kaj manĝaĵoj estas, precipe por gejunuloj, taŭga motivo por eklerni kaj plulerni Esperanton.

Bona Esperanto-aranĝo – helpanto de instruanto!

La etoso estos bonega. Esperanto-gejunuloj, kiuj partoprenis la Rokfestivalon en 2009, deziras tien reveni!

Kunlabore kun la organizantoj – DEJO, Maria Majerczak

“Mia edzino fariĝas malsaneta”, diris Alberto. “Sed ŝi ja baldaŭ fariĝos 86-jara, oni devas do esti iom pli komprenema”.

“Pro kio ŝi suferas?” demandis la najbaro.

“Preskaŭ pro nenio, sed kiam ni devis pluki la pomojn pasintan aŭtunon, ŝi eĉ ne povis grimpi la pomarbon.”

Leviĝas dana voĉo

Avertas kontraŭ la angla danĝero profesoro de la angla.

Atentu, la angla forpuŝas la danan en niaj universitatoj. Oni timas, ke la faka nivelo malaltiĝas, ĉar nek esploristoj nek studentoj povas sin precize esprimi en la angla.

Tiel avertas Niels Davidsen-Nielsen, kiu pasintan aŭtunon (aŭstralia printempo) forlasis sian postenon kiel prezidanto de Dana Lingvokomisiono, kaj kiu verkis “Moders stemme, fars hammer” (La voĉo de patrino, la martelo de patro”. Tial Niels Davidsen-Nielsen, kiu do estas eksprofesoro de la angla, avertas nin pro tio, ke la angla sin tro multe disvastigas.

Sed, come on, Niels Davidsen-Nielsen, what’s the problem?

“La problemo estas, ke estas mito, ke ĉiuj parolas la anglan en Danujo. La plej multaj instruistoj, kiuj provis instrui en la angla, bone scias, ke oni diras nur tion, kion oni povas, anstataŭ diri tion, kion oni volas. La instruado estas multe pli rigida kaj enuiga ol ĝi bezonas esti.”

Sed la plej multaj danoj povas ja komprenigi sin per la angla, ĉu ne?

”Jes, sed ni ja ne parolas pri flughavena angla. Ni parolas pri la akademia angla. La instruantoj devas esti diplomitaj, kaj la lingva nivelo de la studentoj devas plialtiĝi. Tio kostos monon. Ĉu la universitatoj havas tiom da mono? Kaj ĉu tio valoros la penon?

Kial tio ne valoru la penon?

”Ĉar ni havas ankaŭ alian seriozan problemon. Ni riskas, ke kreiĝos lingvolimo en la dana popolo. Se la esploristoj povos informi nur en la angla, tiam estos eĉ tre malfacile eduki la ordinarulojn. La angle parolanta elito kaj la dane parolanta malsupra klaso eĉ pli malproksimiĝos.”

Kial oni kredas, ke oni parolas pli bonan anglan ol oni fakte faras?

“Mi jam renkontis multajn homojn, kiuj konvinkiĝis, ke la angla estas io, kion oni mastras. Sed nia mastrado de la anglo ĉiam estos malpli bona ol nia mastrado de la dana. La vojo plibonigi sian anglan parolkapablon estas kvazaŭ Alpoetapo, kaj ni staras nun nur ĉe la montpiedo.”

Ĉu oni ne parolu kiom eble plej multe la anglan en la universitatoj por fariĝi pli kapablaj?

”Learning by doing povas esti iomete bona, sed kiom rapide pliboniĝas nia angla kiam danoj parolas la anglan nur kun danoj? Ni devas decidi, kiom ni devas instrui en la angla. Ĉu ni permesu, ke la angla forbalau la danan en la universitatoj?”

Kial estas tiom malfacile por dano paroli la anglan?

“Jam en la 19-a jarcento, kiam ni malkovris la anglan, ni konstatis, ke precipe ĝia elparolado estas komplete nebla. Kaj tio certe estas ankoraŭ problemo.

Ĉu tio ne pliboniĝos, se ni daŭre ekzercas nin en la angla?

”Jes – keep trying. Mi tutsincere konsentas. Kaj espereble ni post unu aŭ du generacioj pli bone parolos la anglan. Sed samtempe ni perdos nian kapablon paroli dane pri akademiaj aferoj.”

Anyway, vortoj venas nature en la lingvon, ĉu ne? Ĉu io farendas pri tio?

”Se temas nur pri prunteprenitaj vortoj, mi restas trankvila. Ni ĉiam prunteprenas vortojn el aliaj lingvoj. Sed kompreneble gravas, ke ni havu danan terminologion por fakaj esprimoj. Ni ja ne povas alparoli la danan popolon en la angla. Estas unu miliono da danoj, kiuj ne parolas la anglan. Do kial insistu por pli da angla en la universitatoj? Mi diras nur: Cool it, pals!

Lasse Lundberg Andreassen